

La Komitato de Feminisma Esperanta Movado,

kunsidanta en Bazelo la 2an de oktobro 2004,

leginte la diversajn tekstojn pri FEM sub la responso de s-ro Kalle Kniivilä, redaktoro de "Libera Folio";

rimarkinte ke jam en junio 2004 s-ro Kniivilä kontaktis gec-anojn Kaiser kun la celo ne informadi pri feminismo, sed kalumnii aliajn personojn kaj organizojn, kaj tial gec-anoj Kaiser fine rifuzis la aperigon de intervjuo;

konstatinte ke s-ro Kniivilä neniam aperigis efektivan intervjuon al iu ajn pri FEM, sed nur mistorde plukis ie kaj tie frazojn;

emfazinte ke s-ro Kniivilä neniam kontaktis rekte por intervjuo aŭ klarigo la prezidantaron de FEM;

denuncinte la arogantecon laŭ kiu s-ro Kniivilä rilatis kun FEM, interalie atribuante al HeKo (kiu estas distribuanto de gazetaraj komunikoj) la responson pri gazetara komuniko kiu venis el la prezidantaro de FEM (lia titolo "HeKo drasas Kalle Kniivilä" devus esti "FEM drasas Kalle Kniivilä");

DEKLARAS

s-ron Kalle Kniivilä "persona non grata"

ĉe la Feminisma Esperanta Movado,

*informonte ĉiun establaron aliĝintan al la Pakto por la Esperanta Civito pri la supra deklaro.
unanime aprobis kaj subskribis*

Marie-France Conde Rey, Alga Guernieri, Anna Lászay